# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.

Nro 1. Praha, marto 1953 Aperas laŭbezone

"Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj ... Kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo."

L.L.Zamenhof 1907

\- -

Svaz čs. esperantistů likvidoval v r. 1952, čímž bylo ukončeno i vydávání svazového věstníku. Klub esperantistů při OB v Praze 2 zodpoví všechny dotazy ohledně hnutí. Přikládejte vždy známku na odpověď. Adresa předsedy klubu: Jaroslav Šustr, Dlouhá tř. 10, Praha I. Klub má na skladě ještě několik rozmn. výtisků učebnice prof. Ing Krajíce, kterou zašle za Kčs 22.-.

\- -

Pravidelné schůzky pražských esperantistů jsou každou středu od 20 hod. v klubovní místnosti restaurace "U Šumavy" Štěpánská ul., Praha II. Programy klubovních večerů vám dávají možnost k zdokonalování se konversací, poslechem hodnotných přednášek z nejrůznějších vědních oborů i ušlechtilou zábavu po práci.

\- -

Někteří členové dosud nevyrovnali své příspěvky klubu za rok 1952. Přikládáme proto složenku s prosbou, aby použili této možnosti případně i pro rok 1953. Členské příspěvky:

| | | |
|---|---|---|
| činný člen | Kčs | 120.- |
| vojáci, učni, studenti | | 50.- |
| rodinní příslušníci | | 40.- |

\- -

Ni rekomendas al niaj membroj aboni luksan monatan revuon

EL POPOLA ĈINIO

Aliĝon sendu al s-ano Jar. Šustr kaj Orbis sendos al vi poŝtpagilon.

\- -

Niaj membroj Josef Forman kaj Věra Krausová geedziĝis la 28.11.1952 en Praha. Ni kore gratulas al la geedzoj! Bela bildo de tiu ĉi esper. geedziĝo aperis en la unua numero de Heroldo de Esperanto kaj iris vere en ĉiujn mondpartojn!

\- -

NI ATENDAS VIN MERKREDE LA 18AN DE MARTO OKAZE DE

\- - VARIETEA JOZEFA VESPERO - -

en nia klubejo - restoracio "U Šumavy". Ĉiu Jozefo ricevos neforgeseblan donacon. Ĉefreĝisoro neforgesebla Antonio Slanina. Venu kaj vidu!

\- - - -

Samideano Dro Pravoslav SÁDLO, violonĉela virtuozo, membro de EK en Praha, donas sian unuan koncerton en la Domo de Artistoj sabate la 28an de marto 1953 je la 19,30 horo.
Neforgeseblaj estas la ravaj melodioj de la instrumento, kiun s-ano Sádlo tiel majstre regas! Lia sorĉa ludo multfoje fariĝis "ora najlo" de niaj programaj vesperoj. La komitato de EK kredas, ke nia membraro profitos la okazon por montri sian dankemon al la artisto kaj ke ni ĉeestos lian koncerton en nombro vere impona.

- -

Dimanĉe la 22an de marto je la 19,30 horo en la Domo de Artistoj koncertas pianistino E. Hodinářová. Ni varme rekomendas ĉi tiun koncerton al niaj membroj. La artistino ne estas al ili fremda. Ofte ŝi pianlude akompanas samideanon Sádlo dum liaj koncertoj.

- -

MONDA KRONIKO

Laŭ Heroldo de Esperanto la nombro de kongresanoj, aliĝintaj por la 38a U.K. en Zagreb, estis je la fino de januaro 708 (pasintjare por Oslo 687).

-

26a kongreso de S.A.T. okazos en Ŝefildo (Britio) la 25 - 31 de julio 1953. La kongreso ne okazos direkte en la urbo, sed en la kasteleto (iama hejmo de angla aristokrato), kiu situas 12 km de la urbo. Tie en belega kampara regiono oni kongresos, kunvenos, loĝos kaj manĝos. Do, preskaŭ ĉio estos sub la sama tegmento!

-

24a Internacia kongreso de katolikaj esperantistoj okazos la 12 - 16 de aŭgusto en la fama pilgrimurbo Lourdes.

-

7a argentina kongreso de esperanto okazos en Bahia Blanca la 2 - 5 de aprilo 1953. Ĵus ni legis, ke iama nia membrino s-ino Sonja Portnová - Milkuschutz estas inter la aliĝintoj al ĉi tiu kongreso.

-

Beneluksa Esperanto - kongreso okazos en Antverpeno la 23 - 25 de majo 1953.

-

Germana Esperanto - kongreso okazos dum pentekosto en Frankfurto.

-

Sukcesa Esperanto - kongreso de Novzelando okazis la 29 de decembro 1952 - 2 de januaro 1953 en Auckland.

-

Rektoro de la universitato, la urbestro kaj multaj universitataj profesoroj ĉeestis solenan malfermon de la Esperanto - kurso en la Supera Komerca lernejo en Montpellier (Francujo).

-

Tutmondan ekspozicion de infandesegnaĵoj aranĝos dum aŭtuno la Sveda Laborista Esperanto - Asocio, Barnhusgatan 8, Stockholm, Svedujo, kunlabore kun ĉiutaga gazeto "Aftontidningen". Moto de la desegnaĵoj estos "Laboro kaj festo en mia hejmregiono". Poste oni cirkuligos la ekspozicion tra tuta Svedlando.

-

Someraj Kursoj de Esperanto en Doksy versimile ankaŭ nunjare okazos. Interesuloj ricevos ĝustatempe ĉiujn necesajn informojn.

-.-.-.-.-